

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1994/1

**Karlskoga:
nia esperanto-edukejo
sukcese pluedukas
– nun ankaŭ
ne-esperantistojn!**



La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Februaro 1994 • 82-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktör/redaktoro:
Per Aarne Fritzon,
Västertorpsvägen 154,
129 44 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Frågor om prenumeration o. dyl.:
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: Quintus, Sollentuna 1994

Prenumeration 1994: 150 kr. Gävo-
prenumeration till utlandet: 80 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår
i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax: 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla
öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1994:
Direktansluten medlem 150 kr.
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt
medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning
Kvinpinto.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Mölllevångsgatan 20B,
Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar
kl. 17-18. Skriftliga beställningar
expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



KLUBO MIL

Bela donaco al SEF:
10 000 kronoj

Ĝuste kiam la elspezoj de SEF momente
estas timige grandaj pro la ŝanĝo de Cen-
tro, konvene venis ĝojiga informo pri be-
la donaco. H. Sundström el Älvsjö poŝt-
ĝire sendis ne malpli ol 10 000 kronojn
(dek mil!) kiel donacon al SEF.

Ni enkalkulas tiun donacon kiel koti-
zon al la fieraj **Klubo Mil** de 1994. Al tiu
klubo jam aliĝis ankaŭ:

Norrköpings Esperantoklubb 1000
Kerstin Kristoferson, Stockholm 1000

*Novaj membroj, ĉu personoj aŭ kluboj,
estas bonvenaj al SEF-poŝtgiro 20 12-3.
Indiku "Klubo Mil" sur la pagilo.*

DONACOJ

Hilding Andersson, Arvika 100. Umeå Es-
perantoklubb (Till Elisabeth Zandéns
minne) 100. Jan Hornö, Göteborg 5. Alf
Erichsen, Mölnlycke 20.

Krome aŭtoĝire al banka kaj poŝta ĝir-
kontoj 150 kronoj. Novaj donacoj, gran-
daj aŭ malgrandaj, estas ĉiam same bon-
venaj al SEF-poŝtgiro 20 12-3. Indiku
"Donaco" aŭ "Klubo Cent" sur la pagilo.
Ĝuste nun SEF vere bezonas vian apo-
gon.

(La tie ĉi notitaj donacoj alvenis antaŭ la
10-a de januaro.)

KLUBO CENT

Tore Fors, Billeberga 500
Gustav Nygård, Göteborg 100
Harald Lindros, Ljungby 100
Jarl Hammarberg, Stockholm 100
Anna-Greta Strönne, Malmö 100
Jan Strönne, Malmö 100

Ŝanĝita aspekto de *La Espero*

KIEL JAM KUTIME ĉiun duan aŭ trian jaron
La Espero denove iom ŝanĝas sian aspek-
ton, sed ĉi-foje ne tre draste.

Ĝis la fino de 1993 ni uzis por la teksto
kaj titoloj la litertipon *Photina*, kiun dese-
gnis J. Mendoza y Almeida en 1971 (unu
el la unuaj litertipoj speciale desegnitaj
por fotokompostado). Ek de ĉi tiu nume-
ro la uzata litertipo havas la komercan
nomon *Esperanto* kaj ĝin desegnis Franko
Luin en 1992, kaj kompletigis per mal-
larĝaj variaĵoj en 1993. Entute ekzistas
deko da diversaj variaĵoj de la litertipo
Esperanto (normala, kursiva, dika k.t.p.).

Por *La Espero* Franko kompletigis la li-
tertipecon per la supersignitaj literoj, ki-
ujn la lingvo esperanto uzas.

Estus interese aŭdi, ĉu vi opinias, ke la
gazeto estas pli facile legebla ol pasint-
jare, aŭ kontraŭe.

Esperantoförbundets styrelse

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen,
tel. 08-777 41 75

Vice ordförande: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby,
tel. 08-590 88210

Sekreterare: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-41 22 05

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-17 36 87

Styrelseledamot: Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten,
tel. 08-97 47 76

Styrelseledamot: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, 641 37 Katrineholm,
tel. 0150-523 87

Suppleant: Leif Nordenstorm, Björknäsvägen 3 C, 961 34 Boden,
tel. 0921-123 54

Suppleant: Anita Bergh, Hasselgatan 60, 2 tr, 194 37 Upplands Väsby,
tel. 08-590 858 72

Adjungerad: Aira Kankkunen, Dr Forselius gata 60, 413 26 Göteborg,
tel. 031-18 79 82

Intensaj studoj en Karlskoga

LA AŬTUNA SEMESTRO en la popolaltnernejo de Karlskoga estis vigla el vidpunkto de Esperanto-studado. En la unua 8-semajna kurso partoprenis 14 studentoj kaj en la daŭriga 18 studentoj. Entute ne malpli ol 70 studentoj partoprenis en 6 diversaj kursoj. Tion raportas **Lars Forsman**, la motoro de la Esperanto-aktivecoj en la popolaltnernejo.

Novaĵo de tiu ĉi aŭtuno estis la Eŭropo-kurso, en kiu dek gejunuloj studas Eŭropon pere de tri lingvoj – la sveda, la angla kaj Esperanto.

Dum la unua semestro ĉiuj intense studis Esperanton ok horojn ĉiusemajne, por ke ili la duan semestron povu legi artikolojn pri Eŭropo el la esperanta gazeto. Eble la grupo, kune kun aliaj esper-

antistoj, printempe faros per-esperantan studvojaĝon al iu eŭropa ĉefurbo.

La kursoj de la Esperanto-fako estas tre popularaj, ĉar ili facile konatiĝas kun rifuĝintoj en la lernejo kaj helpas ilin. Multaj festenetoj dum la semestro aranĝiĝis per Esperanto.

La Esperanto-aktivado do vekis la scivolemon de multaj el tiuj lernantoj, kiuj venis al Karlskoga por studi aliajn fakojn. Multaj el ili komencis studi la lingvon en la posttagmezoj kaj vesperoj. Lars Forsman komentas, ke montriĝis facile logi al studado pri Esperanto, kiam oni havas sufiĉe da bonaj instruistoj. Dum la aŭtuno instruis en Karlskoga, krom Lars Forsman, ankaŭ **Tatiana Rudakova** el Rusio kaj **Elo Charles Fuakvanzo** el Zairio.

Krom la ordinara instruado, okazis ankaŭ aliaj esperantaj aranĝoj. Kiel gastprelegantoj la kursojn vizitis la estono **Rein Saag**, la anglo **Harold Brown** kaj la svedino **Puff Östling**. La festadon de la Zamenhof-tago la 15-an de decembro kronis koncerto de **Ĵomart** kaj **Nataŝa**.

Ankaŭ en 1994 okazos pluraj kursoj en la popolaltnernejo de Karlskoga. Jen la datoj:

Somera kurso (kvarnivela)

13–18 junio 1994

8-semajna kurso por komencantoj

22 aŭgusto–14 oktobro 1994

8-semajna daŭriga kurso

24 oktobro–20 decembro 1994

Notu, ke dum la somera kursosemajno unu kurso estos speciale dediĉita al lingvoinstruistoj kaj instruistoj kun intereso pri internaciaj demandoj. Informu viajn instruistajn konatojn aŭ ĉe lernejoj en via proksimeco!

Eksterlandanoj povas partopreni dum parto el longa kurso kaj tiam pagi proporcie al la studotempo. Eksterlanda partopreno estas kore bonvena – ĉe la Esperanto-fako de Karlskoga jam studis lernantoj el 25 landoj.

Varbu al la kursoj en Karlskoga! Eblico de stipendioj ekzistas.

Pliajn informojn donas:

Esperanto-linjen,
Karlskoga Folkhögskola,
Box 192, S-691 24 Karlskoga,
tel: 0586/503 60, fakso 0586/370 77.



Lernantoj de la Eŭropo-kurso ĉe la popolaltnernejo de Karlskoga. Inter multaj aliaj aferoj oni studas ankaŭ Esperanton.



Intensa ekzercado en la lingvo-laboratorio de la popolaltnernejo de Karlskoga.

Nekrologo

Elisabeth Zandén

La 30-an de novembro 1993 mortis Elisabeth Zandén post mallonga malsano en la hospitalo de Umeå.

Ŝi estis tre interesata de Esperanto kaj partoprenis inter alie kurson en la popolaltlernejo de Karlskoga. Ŝi ankaŭ partoprenis la UEA-kongreson en Bergen 1991.

Ŝi restos en nia memoro kiel fidela amiko.

La Esperanto-klubo de Umeå

NY ADRESS

Esperantoförbundets nya adress är:

Esperantoförbundet,
Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm,
telefon 08-34 08 00
(fax 08-34 08 10).

Närmaste tunnelbana är St Eriksplan, pendeltåg Karlberg. Vikingagatan ligger i en av de centrala delarna av Stockholm.

Billigare logi på SEF-kongressen

Obekvämt men trevligt bor du med SEJU på Höörs Scoutgård, 3,5 km från kongresslokalen. Frukost och kvällsmackor lagar vi gemensamt i ett välutrustat kök.

Kostnad: 20 kr per natt plus del i matutgifter.

Medtag sovsäck. Madrasser finns.

Ingen förhandsanmälan.
Information: Mikael Felix, tel. 046 - 32 35 74, eller Kajsa Larsson, tel. 08 - 97 46 26.

Kongresaj kotizoj kaj prezoj

<i>Kongreskotizoj</i>	<i>Prezo</i>	<i>Kodo</i>
Pago ĝis la 15-a de marto	200:–	A
Pago post la 15-a de marto	275:–	B
SEJU-membro malpli ol 20-jara:		
Pago ĝis la 15-a de marto	100:–	C
Pago post la 15-a de marto	150:–	Ĉ
Tagkarto por nur vendredo	75:–	D
Tagkarto por nur sabato	125:–	E
Tagkarto por nur dimanĉo	100:–	F
<i>Kongresaj pakajoj po persono – sen ekskurso</i>		
Unu-lita hotelĉambro + manĝoj	1100:–	G
Du-lita hotelĉambro + manĝoj	900:–	Ĝ
Gastejmo: kvar-lita ĉambro + manĝoj	700:–	H
Gastejmo: du-lita ĉambro + manĝoj	700:–	Ĥ
<i>Apartaj prezoj po persono</i>		
Unu-lita hotelĉambro + matenmanĝo/nokto	500:–	I
Du-lita hotelĉambro + matenmanĝo/nokto	275:–	J
Gastejmo: du-lita ĉambro/nokto	150:–	Ĵ
Gastejmo: kvar-lita ĉambro/nokto	125:–	K
Unuopaj manĝoj:		
<i>Vendrede:</i> Tagmanĝo – Vespermanĝo	150:–	L
Kafo + kuko (vespere)	30:–	M
<i>Sabate:</i> Matenmanĝo	45:–	N
Kafo (antaŭtagmeze)	30:–	O
Lunĉo	70:–	P
Kafo (posttagmeze)	30:–	R
Vespermanĝo	150:–	S
Kafo (vespere)	30:–	Ŝ
<i>Dimanĉe:</i> Matenmanĝo	45:–	T
Kafo (antaŭtagmeze)	30:–	U
Lunĉo	70:–	Ŭ
Ekskurso	75:–	V
Komencanta kurso	senkosta	Z

Pagu al poŝtĝ-ira konto 481 43 95-2, SEF-jarkongreso, indikante la kodojn de la pagataj eroj.

Plej lasta aliĝdato por loĝado estas la 15-a de aprilo! (Post tiu dato ni ne povas garantii loĝadon laŭ via deziro.)

Adreso de la kasisto: Gertrud Lund, Falkmansgatan 7 B, 217 62 Malmö, tel: 040/805 50. Informoj ankaŭ ĉe ges-roj Andreasson, tel. 0415/501 52.

Ska du aĉka pa kongress i Korea?

1994 års esperanto-världskongress äger rum 23-30 juli i Seoul, Sydkorea. Förutom allt det som själva kongressen har att bjuda, är detta ett tillfälle att besöka ett fascinerande land. Om många beställer tillsammans, kan flygbiljetten fås till förmånligare pris, omkring 7.000 kr. Är du intresserad av att delta i en gruppresa, kontakta:

**Roland Lindblom, Stenbockens gata 102,
136 62 Handen, tel 08 - 777 41 75**

Jen ĉio, kion vi bezonas scii pri la sveda jarkongreso en Höör

Provizora programo

por la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio en Höör
inter la 27-a kaj 29-a de majo 1994

Vendrede la 27-an de majo

15.00	La akceptejo ekdeĵoras en Åkersberg
17.00-18.00	Vespermanĝo
19.00-	Interkona vespero

Sabate la 28-an de majo

08.00	Matenmanĝo
09.00-10.00	Jarkunvenoj de ILEI, SEJU, KELI kaj Eldona
10.00-10.15	Kafo
10.15-11.15	Jarkunvenoj de ILEI, SEJU, KELI kaj Eldona
11.15-12.00	Regionaj diskutoj
12.00	Lunĉo
13.00-14.00	Solena malfermo
14.00-14.15	Paŭzo
14.15-16.00	Jarkunveno de SEF
16.00-16.15	Kafo
16.15-17.15	Prelego (ĉefa)
18.00	Vespermanĝo
19.00-	Distra vespero

Dimanĉe la 29-an de majo

08.00	Matenmanĝo
08.30-09.15	Diservo
09.30-10.30	Prelego
10.30-10.45	Kafo
10.45-11.45	Aŭkcio
12.00-13.00	Fermo
13.00-14.00	Lunĉo
14.00-	Ekskurso al Bosjökloster

Pri loĝado

La hotelo troviĝas en la kongresejo mem. La ĉambroj estas modernaj kun duŝo kaj necesejo. Kelkaj ĉambroj estas adaptitaj por handikapuloj.

Gasthejmo 1: En la kongresejo mem troviĝas modernaj kvarlitaj ĉambroj. Duŝo kaj necesejo en la koridoro. Duetaĝaj litoj.

Gastehejmo 2: En aparta domo je 5-minuta promendistanco, Ekeliden, troviĝas dulitaj ĉambroj. Duŝo kaj necesejo en la koridoro. Eblas mem kuiri.

Ju pli frue vi aliĝas, des pli granda estas via ŝanco ricevi loĝadon laŭ via prefero!

Ekskurso

Dimanĉe posttagme okazos ekskurso al la kastelo Bosjökloster kun ties bela ĝardeno ĉe la lago Ringsjön. La kastelo fondiĝis jam en la jaro 1080 kiel monaĥinejo. Nun ĝi apartenas al la nobela familio Bonde.

Kurso por komencantoj

Paralele kun la kongreso okazos senkosta komencantnivela kurso por gefamilianoj en la sabata kaj dimanĉa antaŭtagmezoj. Kursgvidanto estos **Anna-Maria Lange**.

Notu: Antaŭaliĝo absolute necesa!

3 el 5 jam aperis!

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Parto 3 = 120 kr

Eldona Societo Esperanto
Box 7502, 200 42 Malmö
Poŝtĝiro 578-5

Litova Esperanto-centro en historia domo

LA 11-AN DE DECEMBRO 1993, dum festado de Zamenhof-tagoj, okazis en Kaunas la inaŭguro de nova Esperanto-centro. La domo, kun adreso Zamenhofo gatve 5, siatempe apartenis al **A. Zilbernik**, la bopatro de **L.L. Zamenhof**, kiu finance helpis al la aperigo de la Unua libro!

La domo estis donacita al la Litova Esperanto-Asocio de la litova registaro, kiu ankaŭ senkoste riparigis ĝin. Tio estis rezulto de klopodoj, kiujn en 1984 komencis la tiama litova sekcio de Soveta Esperanto-Asocio. Kiel la unua organizo en Litovio, Litova Esperanto-Asocio estis restarigita la 9-an de decembro 1988, kaj do oni nun festis ankaŭ la kvinjaran jubileon de tiu evento.

Al la inaŭguro venis gastoj el Pollando, Germanio, Francio, Belorusio, Estonio kaj Svedio. Mi mem transdonis salutojn kaj tri librojn de Sveda Esperanto-Federacio, kaj ankaŭ kunportis salutojn de la litova ambasadoro en Svedio, **Romualdas Kalonaitis**, kiu estas esperantisto kaj membro de LEA.

Plej grava gasto estis la nepo de L.L. Zamenhof, **Louis Christoph Zaleski-Zamenhof**. Tiu ĉi estis lia dua vizito en la domo. La unua okazis la 2-an de oktobro 1993, kiam li venis kun la konata pola esperantisto/filmisto **Roman Dobrzyński**. Ili tiam faris vojaĝon laŭ la spuroj de Zamenhof, kaj Dobrzyński filme dokumentis la vojaĝon.

Pro malbona vetero, la inaŭgura ceremonio antaŭ la domo estis mallonga. Louis Zaleski-Zamenhof diris i.a., ke estas por li tre kortuŝa momento eniri la domon, en kiu loĝis lia avino, **Klara Zilbernik**.

Louis Zaleski-Zamenhof jam dum sia pli frua vizito rakontis al mi, ke li esperantistiĝis pro la Universala Kongreso en Stokholmo en 1934. Li estis tiam naŭ-jara, kaj liaj gepatroj diris, ke se li volas iri al la kongreso, li devas lerni Esperanton.

Dum la Zamenhof-tagoj okazis ankaŭ la jarkunveno de LEA. Prezidanto de la asocio elektiĝis **Povilas Jegorovas**, kiu multe aktivis en la klopodoj akiri la do-



La historia Zilbernik-domo en Kaunas.

mon. Unua vicprezidanto elektiĝis **Arimantas Rackaus**, kiu estas la urbestro de Kaunas. Pro grava registara kunveno en Vilnius, li ne povis partopreni la inaŭguron, sed li venis dimanĉe por renkontiĝi kun Louis Zaleski-Zamenhof.

Dum la inaŭguro, la komunumon de Kaunas anstataŭe reprezentis la estro pri kulturo kaj edukado, **Sigitas Randis**, neesperantisto. Li rakontis, ke Esperanto nun estas elektable studfako en la mezlernejoj, sed bedaŭrinde neniu lernanto ĝis nun elektis ĝin.

Fakte estas multe pli da intereso por la sveda lingvo. Mi mem instruis ĝin printempe al komence 70 gimnazianoj, el kiuj fine restis 25. La komunumo planas oferti instruadon de la sveda jam de la dua klaso en la elementa lernejo, se sufiĉe da gepatroj montras intereson.

Sven-Erik Stjernman



La inaŭguron de la Litova Esperanto-centro en Kaunas festas i.a. la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas (dua de maldekstre) kaj Louis Christoph Zaleski-Zamenhof.

Ĉiuj legantoj estas bonvenaj viziti la domon. Kontakto kun: **Litova Esperanto-Asocio, A/K 167, LT-3000 Kaunas-C, Litovio, tel.: + 370 7 20 85 03.**

Ankaŭ mi mem bonvenigas vizitantojn. Mi loĝas en Kaunas de unu jaro, kaj planas resti ĉi tie ankoraŭ unu jaron. Kontakto min per la adreso: **Sven-Erik Stjernman, Putvinskio 12-3, LT-3000 Kaunas, Litovio, tel./fakso + 370 7 22 51 25.**

Tra la mondo

Tutlanda renkontiĝo en Tanzanio

TANZANIAJ ESPERANTISTOJ invitas al partopreno en sia dua tutlanda renkontiĝo. Ĝi okazos inter la 11-a kaj 18-a de junio 1994 en la proksimeco de la lago Viktoria.

Dum la semajno okazos ekskurso al la proksima, monde konata nacia parko Serengeti. Se eblas, oni ankaŭ aranĝos kursojn dum tiu kaj la posta semajnoj.

Petu informojn de: **Mramba Simba**, SLP 51, Bunda-Mara, Tanzanio.

Stipendio Ivo Lapenna

MEMORE AL PROF. D-RO IVO LAPENNA (1909 – 1987) kaj al liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo ĝenerale kaj ties aplikado en la scienco speciale, Fondaĵo Ivo Lapenna starigis la *Stipendion Lapenna*.

La stipendio konsistas el subvencio al kiel eble multaj disertacioj je universitata nivelo (doktoriĝoj, magistriĝoj, licencioj), kiuj temas pri esperantologio kaj/aŭ pri Esperanto en rilato kun interlingvistiko kaj estas ellaboritaj en la spirito de L.L. Zamenhof kaj Ivo Lapenna.

Ankaŭ en 1993 la stipendio, je sumo de 100 svisaj frankoj, estis aljuĝita por unu faklaboraĵo: *Lingue naturali e lingue artificiali: La sintassi dell'inglese e dell'Esperanto* (Naturaj kaj artefaritaj lingvoj: la sintakso de la angla kaj de Esperanto), disertacio de d-rino **Paola Pruzzi**, akceptita de la universitato de Pavia, Italio.

Aŭtoroj dezirantaj kandidatiĝi al la stipendio, bv. peti la detalan regularon de la sekretario-kasisto de Fondaĵo Ivo Lapenna: s-ro **Torben Svendsen**, Vanløse Allé 57, DK-2720 Vanløse, Danlando.

27-a somera studsemajno en Jyväskylä

4–8 julio 1994

LA SOMERA UNIVERSITATO kaj la Esperantoklubo de Jyväskylä kunaranĝas diversnivelajn kursojn. Instruistoj: **Zsuzsa Barcsay** (Hungario) kaj **Till Dahlenburg** (Germanio). Krome la loka esperantoklubo aranĝas varian libertempan programon ĉiuvespere. Post la semajno eblas

resti kelkajn tagojn por fari la elementan aŭ mezan UEA/ILEI-ekzamenon.

Pliaj informoj: **Seija Kettunen**, Keihäsmiehenkatu 3, FIN-40630 Jyväskylä, Finnlando.

Kleriĝu Svislande

LA KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (KCE) en La Chaux-de-Fonds, Svislando, pasintdecembre festis sian 25-jaran jubileon. Ankaŭ ĉi-jare ĝi ofertas multajn eblecojn plikleriĝi kaj pri Esperanto kaj pere de Esperanto pri aliaj aferoj. Dum la tuta jaro vin tie atendas, krom agrabla medio kaj esperantisma etoso, diversgradaj lingvokursoj, kulturaj, sciencaj kaj turismaj aranĝoj multspecaj, kaj ankaŭ la ebleco

trapasi la UEA/ILEI-ekzamenon. Al la ĉi-jara programo kontribuos i.a. **Claude Gacond**, **Andreas Bickel**, **Tazio Carleva**, **Katalin Smideliusz**, **Giorgio Silfer**, **Francois Degoul**, **Alain Favre**, **Mireille Grosjean**, **Andy Künzli** k.a.

La programkajero estas senpage ricevebla de: **Kultura Centro Esperantista**, CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Someraj kursoj en Turku

6–10 junio 1994

ESPERANTOKURSOJ por komencantoj kaj daŭrigantoj en la somera universitato de Turku en Finnlando. Instruisto: **Andrzej Pettyn** (Pollando).

Pliaj informoj: **Esperanto-societo en Turku**, **Tiina Oittinen**, Puutarhakatu 26 A 11, FIN-20100 Turku, Finnlando.

Svenska Esperanto-Institutet inbjuder till seminariet

"Språket i centrum"

Jönköping 16–17 april 1994

Ur programmet:

- Internationell tolkning av bilder – föredrag av *Eric Londos*
- Internationella planspråk: Fenomen och typexempel – föredrag av *Detlev Blanke*
- Nordisk och annan litteratur på esperanto – föredrag av *Odd Tangerud*
- Variationer i esperanto-undervisningen – föredrag av *Lars Forsman*
- Tyskland efter återföreningen – föredrag av *Detlev Blanke*
- Etymologisk ordbok på esperanto – föredrag av *Ebbe Vilborg*
- *Ifigenia i Aulis* – drama framförd av *Odd Tangerud*
- Diskussion om esperanto-läromedel – inleds av *Bertil Andreasson*

Plats för seminariet är Södra Vätterbygdens Folkhögskola i Jönköping.

Programmet börjar kl. 9.30 på lördagen den 16 april och avslutas kl. 15.30 söndagen den 17 april.

Priser: Program 150 kr, helinackordering i enkelrum (exkl. lakan) 548 kr/person, helinackordering i dubbelrum (exkl. lakan) 467 kr/person, samtliga måltider utom frukost 270 kr.

Anmälan sker genom att betala in anmälningsavgiften 150 kr till Svenska Esperanto-Institutets pg-konto 515 11–4. Resten betalas senast den 31 mars.

Ytterligare upplysningar lämnas av: Märtha Andréasson, tel: 031/57 11 33, eller Inga Johansson, tel: 031/15 57 23.

Nordia Forumo en Turku, Finnlando



1-6 aŭgusto 1994

LA NORDIA FORUMO estas projekto de la Nordia Ministro-konsilio. Ĝi havas la temon "Vivo kaj laboro de virinoj - ĝojo kaj libereco" kaj celas inspiri homojn pri-trakti la demandojn pri egalrajteco. La forumo enkadrigos ekspoziciojn, seminariojn, diskutojn pri diversaj temoj kaj vesperajn programojn kun interesaj kulturaj aranĝoj. Oni atendos ĉ. 10.000 partoprenantojn al tiu ĉi malferma areno por ĉiuj civitanoj kaj sociaj organizoj, kiu okupos la tutan urbocentron de la historia urbo Turku.

La Esperanto-societo en Turku aliĝis al la forumo, kiel jam pli ol 500 diversaj grupoj el tuta Nordio. La societo starigos ekspozicion kaj faros prelegojn pri esperanto kadre de la seminarioj. Venu ankaŭ vi por ĝui internacian nordian etoson dum someraj tagoj kaj noktoj, kaj por montri, kiel funkcias internacia kunlaboro inter esperantistoj!

Pliaj informoj: Esperanto-societo en Turku, Tiina Oittinen, Puutarhaku 26 A 11, FIN-20100 Turku, Finnlando.



Tra la lando

När du läser eller hör något om esperanto...

IVAR NILSSON I UMEÅ samordnar SEF:s mediebevaktning. Vi ber dig att genast rapportera till honom varje gång du ser att esperanto har blivit omnämnt i press, radio eller TV. Skicka honom urklipp eller kopior på tidningsartiklar, eller meddela honom namnet på programmet, när det sändes och på vilket sätt esperanto kom upp. På så sätt hjälper du Esperantoförbundet att hålla reda på vad som sägs om esperanto i svenska medier. Då får vi en bättre bild av vilken slags information som når fram, och kan också reagera snabbare de gånger det behövs ett gemänt. Obs! Varje liten notis är intressant!

Adressen är: Ivar Nilsson, Klövervägen 26, 903 52 Umeå, tel: 090/11 16 25.

Reagoj:

Vortaro bona, tamen ne perfekta

KIAM APERIS LA SVED-ESPERANTA VORTARO de Vilborg (*Ordbok Svenska-Esperanto, OSE*), Bertil Wennergren recenzis ĝin favore en *La Espero* 4-5/93. Mi tiam konsentis kaj ankoraŭ konsentas pri lia prijuĝo. Uzante la vortaron jam pli ol jaron, mi tamen foj-foje faris kelkajn rimarkojn.

La unua punkto notita temas pri ĉiutagaj vortoj modernaj. Multaj tiaj vere enestas, aliaj tamen mankas. Komprenoble vortaro, kiu devas resti uzebla dum jardekoj, ne povas tro multe cedi al laŭmodaj efemeraĵoj. Tial oni devas pardoni la mankon de vortoj kiel *ståuppkomiker*, *tights* kaj amaso da aliaj. Sed el vortoj, kiujn mi hazarde serĉis, mankas ankaŭ *bidragförskött*, *biltull*, *bärsele*, *crème fraîche*, *drogfri*, *folköl*, *hemtjänst*, *kebab*, *liggunderlag*, *PC*, *portkod*, *rödstrumpa*, *skinhead*, *spånskiva* kaj *svartjobb*. Komprenoble ne eblas atingi perfektan kompletecon, pro multaj kialoj. Sed en la vortaro ja estis spaco sufiĉa por *britanniametall*, *kannellyr*, *riksheraldiker*, *sexdagarslopp*, *sweater*, *tigrerad*, *världsklokhet* kaj aliaj necesaĵoj! Ĉu eblus estonte kompletigi la komputilan version de la vortaro?

Examina

SVENSKA ESPERANTOINSTITUTETS skriftliga prov för högre och lägre examen i esperanto äger rum söndagen den 24 april 1994. Avgift 25 kr.

För övrig information och anmälan, kontakta Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg.

Värdinna/expeditör på EC

EN TID FRAMÖVER kommer Jeanette Carlsson att arbeta som värdinna/expeditör på Esperanto-Centro. Hon är anställd via ett "ALU"-projekt (ALU = arbetslivsutveckling), och arbetar heltid under ett antal månader.

Jeanette har gått 16 veckor på Esperanto-linjen på Karlskoga Folkhögskola.

Ankaŭ inter la esperantaj ekvivalentoj mi trovis kelkajn detalojn por komenti. Temas nur pri hazardaj ekzemploj, ne sisteme mi pristudis la aferon. Ĉe la komputada senco de fil oni trovas nur la proponon *rikordaro*. Kvankam sen fontindiko en *OSE*, tiu vorto mankas en *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)*. Nek en *NePIVaj vortoj* de Cherpillod, nek en komputikaj terminaroj mi trovis ĝin. En *PIV-Suplemento* tamen troviĝas *dosiero* en la senco de *fil*, kaj tiu termino ŝajnas al mi ankaŭ praktike uzata. Domaĝe, ke ĝi mankas en *OSE*!

Ankaŭ aliloke *OSE* ŝajnas ne centprocente konforma al *PIV*. Ĉe *piplärka* ĝi donas unu *PIV*-an formon, *antuso*, tamen mankas la formo *pipio*, kiun preferas *PIV* kaj ornitologiaj terminaroj. Same ĉe folkgrupp ĝi proponas nur *etnio*, kvankam *PIV* preferas *etno*, ĉe *sjöskum* (mineral.) nur *marŝaŭmo*, kvankam *PIV* preferas *sepiolito*, ktp. Entute mi bedaŭras, ke oni ŝajne ne sufiĉe akordigis la vortaron kun *PIV*. Jen ankoraŭ kelkaj specimenoj de ne tro raraj *PIV*-aj aŭ *PIV*-Suplemenataj vortoj, kiujn mi ne trovis en *OSE*: *folo*, *jelpi*, *krepiti*, *leo*, *prefaco*, *setli* - laŭ mia sperto ne nur leksikaj strangaĵoj, sed vortoj efektive praktike uzataj.

Sten Johansson

Kreiva formulado de proverboj

DE TEMPO AL TEMPO aperas en esperantaj periodaĵoj listoj de proverboj, plejparte ĉerpitaj el jam publikigitaj etnolingvaj kolektoj kaj tradukitaj en Esperanton. Alia riĉa fonto de proverboj jam esperantigitaj estas *Proverbaro Esperanta de d-ro L.L. Zamenhof*. En ambaŭ specoj de de prezentoj kutime mankas komentoj pri la enhavo, signifo kaj uzo. Plue, la kompilintoj eĉ ne provis aranĝi la proverbojn laŭ temoj. Mi trovas laŭteman pritrakton de proverboj tre utila, jen por analizado de konceptoj, jen por komparado kun proverboj apartenantaj al aliaj tem-kategorioj. Mi mem jam kolektis saĝajn eldirojn pri la sekvaj temoj: ovoj, Dio, fiŝoj, vino, la diablo, la Esperanto-movado, kokoj, katoj, la fervojo kaj pano.

En la nuna artikolo mi deziras ilustrati ankoraŭ unu manieron utiligi la riĉecon de tiu ĉi aspekto de la folkloro. En tradiciaj socioj, kiuj ne dependas de skriba transdonado de la kultura heredaĵo, la t.n. buŝa literaturo estiĝas spontane kaj anonime. En la kazo de popolrakontoj, proverboj kaj enigmoj, iu nekonata aŭtoro elpensas sian "verkon", kaj poste ĝi disvastiĝas buŝe, unue inter la anoj de la sama vilaĝo aŭ tribo, poste trans ties limojn. Hodiaŭ en industriaj, evoluintaj socioj, elpensado kaj uzo de proverboj estas malpli ofta ol en la pasinteco. Oni eĉ prezentis la argumenton, ke ili ne povas ekzisti en Esperanto. Kontraŭe al tiu mallarĝa vidpunkto, estas esperantistoj, kiuj ne nur uzas proverbojn en vivantaj kunteksto, sed ankaŭ kreas novajn, originalajn proverbojn en Esperanto.

En la sekvaj sekcioj mi priskribos laŭpaŝan manieron krei originalajn proverbojn en Esperanto. La modeloj por la ilustraĵoj estas ĉerpitaj el *Proverbaro Esperanta*, kaj ili estas signitaj per la litero "Z".

Unua paŝo: substituo de rimigantaj silaboj

Uzante unu el la proverboj de Zamenhof kiel modelon, oni povas krei senliman serion de similaj proverboj per substituo de du vortoj.

Z: Eĉ najtingalo ne estas sen galo.

La dua kaj lasta vortoj rimiĝas najtingalo-galo. Jen tri variaĵoj formitaj sammaniere:

- Eĉ leopardo ne estas sen ardo.
- Eĉ serpento ne estas sen pento.
- Eĉ hipopotamo ne estas sen amo.

Dua paŝo: variaĵoj de zamenhofaj proverboj sen ŝanĝo de signifo

La zamenhafa *Proverbaro* provizas multe da krudmaterialo, kiun oni povas iomete prilabori por krei pli freŝan esprimon de la sama penso. Alivorte, la originala proverbo restas kiel skeleto, sur kiun oni metas novan karnon. Komparu la jenajn proverbo-parojn:

Li havas en la cerbo multe da herbo^z / Li havas en la kapo multe da ŝapo.


Neniu ago fariĝas sen pago^z / Neniuj faroj fariĝas sen dolaroj.

Nuda kaj kruda, sen groŝo en poŝo^z / Stulta kaj insulta, sen penso en menso.

Ofte lerte formulita variaĵo povas elvoki la originalan proverbon de Zamenhof.

Tria paŝo: ŝanĝo de vorto, ŝanĝo de signifo

Per ŝanĝo de nur unu vorto oni povas modifi la signifon de la zamenhafa proverbo. Rimarku, ke la rimado estas konservita en ĉiuj ekzemploj:



Kiu frue leviĝas, facile riĉiĝas^z / Kiu frue leviĝas, facile laciĝas.

En ĉiu kranio regas aparta opinio^z / En ĉiu kranio regas aparta manio.

Pli da infanoj, pli da beno^z / Pli da infanoj, pli da ĝeno.

Kvara paŝo: modifo de signifo per inversigo

La sekva speco de modifado konsistas en inversigo de du partoj de la zamenhafa proverbo kun la rezulto, ke la nova proverbo ankoraŭ enhavas saĝan observon pri homa agado:

Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras^z / Nur tiu nenion faras, kiu ĉiam eraras.

Estinta amiko estas plej danĝera malamiko^z / Estinta malamiko estas plej danĝera amiko.

Post la fasto venas festo^z / Post la festo venas fasto.

**Kvina paŝo:
pseudoproverboj por blagaj celoj**
Kelkfoje en satira aŭ humura verko, oni bezonas eldiron, kiu ŝajne estas proverbo pro sia elvokiveco, sed kiu esprimas stultajn aŭ sensencajn:

Ne doloras frapo sur fremda kapo^z / Fremda frapo ne doloras sur kapo.

Virta virino straton ne konas^z / Virta strato virinon ne konas.

Kapuĉo monaĥon ne faras^z / Monaĥo kapuĉon ne faras.

Sesa paŝo: novaj proverboj ligitaj al tem-kategorio

Bona ekzerco estas provo krei novajn proverbojn, kiuj rilatas al specifa temo. La jenaj ekzemploj aludas al diversaj aspektoj de la Esperanto-movado:

Inter la blinduloj regas la strabuloj^z / Inter la eternaj komencantoj regas la unuakursanoj.

Li zorgas pri ĝi kiel pri neĝo pasintjara^z / Li zorgas pri ĝi kiel pri kongres-rezolucio pasintjara.

De unu bovo oni du felojn ne deŝiras^z / De unu aliĝanto oni du kotizojn ne akiras.
Bernard Golden

"Aĉa ĵargono"

"TERURA TEKSTO EN AĈA ĴARGONO PRI ABOMENA sinteno, do bona ekzerco!" Tiel unu fidela partoprenanto karakterizis la ĉi-fojan taskon. Admirinda sinteno!

Efektive pluraj komentis, ke la lingvaĵo de la originala sveda teksto estas de ne tre alta kvalito, ke ĝi estas ĵargona kaj ŝablona. Ni konsentas. Ĵurnaloj ja estas produktataj sub hektikaj cirkonstancoj. Tial la rezultantaj tekstoj ne malofte estas nepoluritaj kaj plenaj de duondigestitaj eroj de la lingvaĵo de la fontoj, ĉu burokrata ĵargono aŭ modaj sloganoj. Sed ilia celo ja estas bona: respeguli okazaĵojn kaj fenomenojn en la konstante ŝanĝiĝanta socio.

La intenco de tiuj ĉi ekzercoj estas, ke ni traduku "bonvole", do klopodu peri la penson kaj la intencitan sencon al esperantlingva leganto, ne ke ni rekreu ĉiun stumblon de tempe premita sveda ĵurnalo. Ŝajnas fakte, ke ĉiuj kontribuantoj al tiu ĉi rubriko jam praktikas tiun sintenon.

Ĉi-foje unu energia tradukemulo liveris al ni ne nur esperantigitan tekston, sed ankaŭ kompletan version en la originala ŝlajera Volapuko de 1880! Ni ne pretendas esti kompetentaj prijuĝi ĝin, sed ŝajnas klare, ke ekz. la frazo "förändringar får man acceptera, men inte psykisk misshandel" ekhavas nekontesteban aŭtoritaton en tiu klasika lingvo:

"Cenis mütoms lensumön, ab mitölati lanik – no."

La ĉi-foja tradukdefio proponas sukan kaj aktualan skandalon. Via tasko, kiel kutime, estas traduki ĝin en bonan Esperanton kaj seĝdi ĝin al **Per Aarne Fritzon** (adreso sur p. 2) antaŭ la 24-a de marto:

"Polisen utreder konståkningsmätarinna Tonya Hardings roll i överfallet på hennes värsta konkurrent, Nancy Kerrigan, uppger ett amerikanskt TV-bolag.

Tre personer har hittills gripits, bland dem livvakten Eric Eckardt. Den 150 kilo tunga jätten knäcktes av samsvetskval och började berätta om överfallet och hur det planerats

Eckardt har enligt pressuppgifter också direkt anklagat Hardings man Jeff Gillooly för att ha deltagit i plane-

ringen av överfallet. Eckardt har enligt tidningsuppgifter också sagt att Harding själv var inblandad, men det bekräftas inte av polisen eller advokater.

Gillooly har förhört av polisen men inte gripits. Han och Tonya Harding hävdar att de är oskyldiga till överfallet förra veckan då Kerrigans knä slogs sönder så att hon inte kunde delta i uttagningsstävlingen inför Lillehammer-OS.

Kerrigan säger sig inte fatta hur någon kan var så ondskefull så att han eller hon slår sönder någon konkurrent. Beträffande utsiktarna att representerna USA i Lillehammer tillsammans med Harding, säger Kerrigan att hon inte har något hon vill tala med Harding om."

(El *Dagens Nyheter* 16/1 1994)

Ĝis, kaj bonan sukceson!

Per Aarne Fritzon
Bertilo Wennergren

Sube sekvas propono de traduko de la teksto en La Espero 6/93. (Ĝi estas kompilita el esprimoj el la alsenditaj tradukaĵoj, krom en tiuj kazoj, kiam ni havas fortan motivon rekomendi alian vortumon.) Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn de iu esprimo aŭ frazo. Angulaj krampoj, kiel en "lernejstr[in]o", indikas eblan sed ne nepran aldonon. La ciferoj referencas al la subaj komentoj. (Se vi malkonsentas pri io, ni bonvenigas viajn reagojn!)


"La Frostigejo" estas interne de la poŝto la populara/vulgara/kutima¹ nomo de la direkcia "projekto por evoluigo de senokupaj dungitoj en la sekcio Leteroj". Ĉi tien la poŝta direkcio translokis tiujn (homojn), kiuj fariĝis superflujaj, kiam la nuna proceso de ŝanĝoj ene de la poŝto atingis ankaŭ la ĉefoficejon². La celo estas helpi al senokupaj dungitoj trovi novan laboron, en aŭ ekster la poŝto. La projekto-difino estas bonintence vortigita, sed la homoj rekte koncernataj sentas

sin nur ignorataj/ekskluzivitaj/ekskomunikitaj/elpuŝitaj kaj izolitaj. Fideluloj/lojaluloj, kiuj laboris 20, 30 kaj eĉ 40 jarojn en la poŝto, trovas sin de la (pasinta) somero tute sen labortaskoj. Ili sidas en nudaj ĉambretoj³ sen nomŝildo sur la pordo, inter transportkesto, kiujn malpaki ili trovas sence. Ilia situacio estas delikata, kaj plej multaj preferas resti anonimaj.

– Ŝanĝojn oni devas akcepti⁴, sed ne psikan mistraktadon/molestadon⁵.

Jen la unuaj vortoj, kiujn ni aŭdas vizitante la ejojn de la formetitoj. Personoj/homoj, kiuj dediĉis al la poŝto sian tutan laboran vivon, esprimas/deklaras (sian) fortan maltrankvilon pri la estonteco, egale ĉu la poŝto fariĝos privata kompanio aŭ ne. La maltrankvilo koncernas la laborejan etoson⁶ kaj la sintenon al/traktadon de la dungitoj.

- ĝenerala = ne-specifa. Tro fidela traduko de la (eĉ en la originala teksto miselektita) vorto "allmänna" ja maltrafas la evidente intencitan sencon.
- Kelkaj proponis "ĉefkontoro"; "kontoro" tamen estas malofte uzata vorto, kaj tial ĝia preciza signifo ŝajnas al ni ne tute evidenta. Certe plej multaj konsentas, ke estas diferenco inter "kontoristo" kaj "oficisto", sed kiu(j) estas la decida(j) diferenco(j) inter "kontoro" kaj "oficejo" en hodiaŭa lingvo-uzo? Ĉu iu nia leganto scias eksplikti? Kiel ajn, en la nuna kazo "ĉefoficejo" sendube estas la ĝusta alternativo.
- Pli ol unu temerara tradukinto skribis "moduloj"... Tia vorto ja ekzistas en Esperanto, sed nek en PIV nek en iu alia vortaro ĝi havas signifon eĉ iomete similan al tiu "antaŭfabrikita ĉambrokonstru-elemento", kiu fariĝis ĝia kutima senco en la sveda. Tiurilate la indiko en la svedesperanta vortaro de Vilborg estas trompa. Se oni volas pli emfaze transdoni la ideon de ne-gemuto, eble "ĉelo" estus uzebla.
- "Förändringar får man acceptera" - en tiu sveda frazo eblas flari fajnajn nuancojn de... ne-troa entuziasmo. Por transdoni ilin, oni eble taduku: "Ŝanĝojn oni eble/verŝajne akceptu, sed ne...", aŭ simile. Unu tradukinto proponis: "Ŝanĝojn oni devas toleri...". Per tiu vortumo oni elektas esprimi la kontraŭvolecon sufiĉe neambigue.
- "Perfortado" aŭ "perfortaĵo" uzeblas nur kiam temas pri (mis)uzo de fizika forto.
- "Laborklimato" estas figuro ne-internacia.



	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	P	A	T	R	I	O	T	E	T	O
2	U		R	E	K	R	U	T	O	N
3	L	E	O	N	O	N		E	G	O
4	A	N	G	O	R	A		R	O	M
5	R	U	O	J		M	O		N	A
6	D	A	N		R	A	D	A		T
7	O	N		D	I	S	E	R	V	O
8		T	I	E	S		S	K	I	P
9	F	O	N		K	R	E	I	T	E
10	A	N	O	D	O	N		V	E	O

Solvo de la krucvortenigmo
en La Espero n-ro 6/1993

Jen la ĝusta fakso-numero

La nova telefakso-numero de Esperanto-Centro estas 08 - 34 08 10. Atentu ke la numero, kiun vi vidis en La Espero 6/93 estis erara.

Kompilis: Lennart Persson

Horizontale:

1. Brulis – En alta grado
2. Bezonas gazeto ĉefan
3. Jararo – Fari kiel poeto
4. Frutempe skandinavlingvan – Grup'
5. Elfroto – Ŝvelaĵeto
6. Strio por talio – Karul'
7. En puno – Malpozitiv'
8. Masklan – Subjunkcio
9. Vojo kun arboj – Urbovoj'
10. Kolordiferenc' – Foliarbo strobila

Vertikale:

- A. Idiotan
- B. Saltulon en arbaro – Prunt'
- C. Pasian amon – Plendokria
- Ĉ. Balkanregionon
- D. Sankta bildo – Pecet'
- E. En osto – Aktivigas sian kapablon
- F. Plibeliganta
- G. Post du – Dombest' – Respubliko Libano
- Ĝ. Pasioplenan
- H. Enpaŝo – Nuligo de decido

EXTRA REA!

Utförsäljning av utgående titlar

Titlar att ge bort till bekanta utomlands:

Tra lando de indianoj, häftad	10:-
Tra lando de indianoj, inb.	15:-
Ture Sventon en Londono	30:-
Varmas en Romo	50:-
Zamenhof bildrakonte	30:-
Vivu la stel'	5:-
Bona rido	5:-
Kredo Floroj Dinamito	5:-
Lingva kvaronhoro	5:-
Mi serĉis oron kaj oleon	5:-

Beställ för minst 100 kr, så bjuder vi dessutom på porto. Vid mindre beställning lägg till 20 kr.

ESPERANTOFÖRLAGET
Box 7502, 200 42 Malmö
Postgiro 578-5

Titlar att ge bort till bekanta här hemma:

Allas andra språk	10:-
Språket över gränserna	10:-
Raka vägen till språkkunskap	10:-
Svensk esperantogrammatik	10:-

Vissa titlar finns bara i enstaka exemplar. Först till kvarn...

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Opinio

Ĉu mitoj kaj simpligoj?

En *La Espero* 3–4/93, **Per Aarne Fritzon** (PAF) komentas komenton de **Birger Bergh** (BB) pri esperanto. Ja estas utile trakti serioze la vortojn de BB, kvankam ili evidente fontas el tradicia klasa aroganteco de universitatoj. Mi tamen bedaŭras, ke PAF inter multaj saĝaj vortoj ankaŭ ripetas kelkajn esperantistajn mitojn aŭ trosimpligojn.

PAF ne ŝatas, ke BB nomas esperanton artefarita, kaj li mencias artefaritajn influojn en naturaj lingvoj por pruvi, ke ne troviĝas baza diferenco inter ili kaj esperanto. Tio estas senmotiva memtrompo. La tuta strukturo kaj baza vortaro de esperanto estas kreita de unu persono en kelkaj jaroj, parte eĉ iom arbitre. Tio tre malsimilas la modestajn planitajn influojn en ekz. la sveda lingvo. Alia afero ja estas, ke esperanto *post 1887* evoluas en maniero simila al naciaj lingvoj. Kiel multaj aliaj utilaj aferoj, esperanto estas artefarita, kvankam kreita grandparte el "natura krudmaterialo". Kiu ne ŝatas artefaritaĵojn, tiu bonvolu forlasisian domon por ekloĝi en groto!

PAF ironiete asertas, ke lingvo ne nomeblas *natura*, ĉar ĝi estas konvencio inter homoj. Sed ja ne temas pri la *enhavo* de tiu konvencio, sed *pri kiel ĝi estiĝis!*

BB asertis, ke ĉiuj lingvoj same malfacilas. Laŭ PAF estas pruvite, ke troviĝas grandaj diferencoj. Mi emas simpatii kun la opinio de PAF, sed ĉu eblas scienca pravigi ĝin? La lingvonivelo de la plimulto de la esperantistoj indikas, ke eĉ en esperanto troviĝas malfacilaĵoj. Persone mi ĉiam stumblas ekz. ĉe la transitiveco de verboj, ĉe intence kreitaj paronimoj kaj ĉe la kaprico, per kiu internaciaj afliksoj aperas en esperanto – bukedo/buĝeto, karoteno/nikotino, difekti/dedukti, riveli/referi ktp. Alia problemo aparta de esperanto estas la manko de re-

ferenca grupo de homoj, kiuj povus atesti "kiel oni diras". Anstataŭe oni oftege devas demandi sin "kiel oni diru", kio kondukas la malsamaj personaj solvoj. Ankaŭ la sinteno de kelkaj uzantoj de esperanto, kiuj tute ne traktas ĝin kiel lingvon vivantan, sed kiel laborkampon de propra hobia inventado, estas sociolinguiva problemo aparta de esperanto.

Male al PAF, mi emas konsenti kun BB pri la signifo de nacia kulturo por riĉigi lingvon. Ĉiu homa lingvo havas egalan potencialan eblon. Sed ne ĉiu ĝis nun evoluis en sama grado. Pro ĝisnuna uzo aŭ ne-uzo kredeble estas pli facile diskuti filozofiajn skolojn en la franca ol en la sudlapona lingvo. Kaj mi pli facile priparolas montaran skiekskurson svede ol esperante. En multaj rilatoj esperanto estas ankoraŭ malriĉa, ne pro tio, ke ĝi estas artefarita, sed simple pro manko de ĉiutaga uzo fare de granda grupo da homoj

kun intensa interagado multflanka. Mankas ekz. diversaj stilniveloj komunuzaj. Ne sufiĉas ja eltrovi esprimojn bezonatajn, necesas ankaŭ certigi, ke la "ricevanto" komprenu ilin proksimume laŭ la intenco. Lingvo vivanta estas komuniki-

lo. PAF atentigas pri latinlingvaj verkistoj en post-Romiaj epokoj, por montri ke ankaŭ ne-nacia lingvo povas disvolvi literaturon. Sed ĉu ne estas interese, ke tiuj aŭtoroj – tre ŝatataj siatempe – hodiaŭ estas nelegataj, dum el la nacilingvaj samtempuloj kelkaj daŭre restas aktualaj? Por ke domo staru necesas fundamento, por ke literaturo ekvivu necesas bazo en la vivo de homoj el karno kaj sango. Iu ajn lingvo, natura aŭ artefarita, nacia aŭ internacia, kiu ĝis nun konkeris nur disajn erojn el tiu vivo, havas bazon malfortikan kaj malprofundan.

Sten Johansson

Kie ĵuron vi aŭdas, malbonon suspektu.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSITITA PER LA LITERTIPO GOUDY VILLAGE]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAKSO 08-712 39 93